


MIHÁLY BABITS

Noton pri l' aŭtoro vidu sur paĝo 125.

MITOLOGIO.

I.



eraklo iris kun pezaj, sed singardaj paŝoj supren en la densejo de Erymanthos. Liaj molaj, krudaj felbotoj apenaŭ donis sonon sur la sekiganta fundo; sian sagujon per branĉretoj li plenŝtopis sur la ŝultro, por ke la sagoj ne faru bruon. Liaj okuloj esploris ĉiudirekte, liaj oreloj streĉiĝis eĉ je la plej eta bruo, kiam ia besto preterglitis dekstren aŭ maldekstren. Lia potenca mano spasme tenis lian pezan arkon. Li postiris tujsekve la postsignojn de l' terura Apro. Ankaŭ li mem similis ian teruran sovaĝbeston, ian fortan kaj lertan arbarloĝanton, kiu marŝas post la predo kun streĉita paŝo kaj malsata volo.

Li bone sciis, kie li pasas: ke Erymanthos estas la nesto de la plej danĝeraj sovaĝbestoj kaj ke krom la persekutata Apro li povas renkonti tie ankoraŭ mil kaj mil bestomonstrojn. Sed neŝanceble li fidis sian forton kaj lin firmigis la memoro de liaj multaj triumfoj. Ne estis sur la tero tia heroo, kia li. Lia volo hardiĝis, lia koro iĝis dura en la multaj bataloj: eble li jam eĉ ne povus vivi sen ili. Elkore li malŝatis la Eurystheojn, kiuj estris lin kaj donis laborojn al li: dum ili mem ne kuraĝus kontraŭstari eĉ malgrandspecan beston. Ili devas sin kaŝi en malvastaj konstruaĵoj, post altaj bariloj, ili devas dungi armitajn servistojn, se ili ne volas pereii.

Ĉar ĉi ekstere la vivo estas nura lukto kaj nur tiu povas

vivteni sin, kiu estas forta. Ĉie embuskas malamikoj kaj ĉio estas ĉies malamiko. Akravida okulo estas bezonata por rimarki la malamikon, rapida kruro por antaŭi, forta kaj lerta mano por faligi. Ungegoj, dentoj, gigantaj makzeloj, pikiloj de venenaj serpentoj sin kaŝas eble post ĉiu laboro. Kaj la vivo mem estas forto kaj arto.

Heraklo sentis kun fiera supereco sian forton, kia ankoraŭ ne estis donita al mortema homo. Kvazaŭ eĉ li mem ne sentis sian mortema: estas certe, ke li ne estas filo de Amphitryo. Eĉ Amphitryo mem ĉiam kun honoro traktis kaj tute ne regis lin per la potenco, per kiu la patroj regas. Ĉar li jam kiel infano montris la fenomenon de sia forto kaj Amphitryo emis kredi, ke ia dio vizitis lian edzinon. Ankaŭ Heraklo kredis tion. Li certe estas frukto de ia ŝtelita, dia nupto, de nokto plena de senmortaj voluptoj.

Heraklo ekridegis. Li ekridegis je la penso, kian naskdonacon li ja ricevis de la dioj — jes, tiun ĉi grandan forton: sed kiu scias, kion ankoraŭ! nevenkeblecon, senmortecon — sekretan donacon, pri kiu eĉ li mem ne scias. Malice li pensis pri tiu ĉi certigita Avantaĝo, kiu li sentis en sia korpo — kaj pri la bestoj kaj la homoj, kiuj luktas kun li nenion konjektante: kiujn li ankoraŭ venkos! Malice li pensis pri la Apro. Li preskaŭ voluptis pro la malfacila tasko, — li ridegis, ridis, li ridis pri la forto de la malamiko! Kun li ridis la suno brilanta tra la foliaro. Kun li ridis la arbaro. Ĝi jubilis de nevideblaj birdoj, sonoris de skaraboj, brilis en gaj-verdaj koloroj. Ho, bone konis Heraklo tiun ĉi gajon, li bone sciis, kion ĝi kaŝas. Liaj akraj okuloj ekvidis la kaŝigantajn birdojn, rimarkis sub la laboroj la estigantojn de la glitsusuraj bruoj, kvankam ilia verdeta, makulita koloro tute fandiĝis kun tiu de l' foliaro. En la tramiksitaj sonoroj kaj kriĉoj, liaj oreloj sciis distingi la voĉon de l' persekutanto kaj persekutato, la vekrion de l' surprizito, la triumfajn aŭ dolorblekajn signifojn. Li sentis per ĉiu fibro, ke la terura, eterna lukto, la kruela amasbuĉo ĉirkaŭ li ne ĉesas eĉ por momento. Li sciis tion kaj ridegis! Ĉar ĉiu ĉi malhela kaj luktanta vivo estas gajo kaj plezuro por tiu, kiu ĝin povas rigardi fortokonscie kaj sen timo.

Sed neniu povas sin cedi senzorge al la plezuro. Oni devas

esti atakpreta en ĉiu momento. Kiu estas tiel forta, ke sekretaj potencoj ne povus lin logi en reton? Ankaŭ Heraklo sentis tion multfoje. Eble la kolero de iu ĵaluza diino persekutis lin pro la sekreta nokto, kiu donis al li la vivon? Aŭ mem la dioj estis enviaj pri lia forto? Ili estas avaraj kaj ĵaluzaj pri l' homo forta kaj eminenta; kaj se ili alie ne povas enkapti lin, ili vekas terurajn pasiojn en lia propra brusto por farigi per li ion tian, kion li pripentis.

Jen kio estas la plej hororiga kaj en Heraklo ankoraŭ ĉiam ekardis la sango, ankoraŭ ĉiam li volis rulbarakti sur la tero kaj ŝiri, kaj bati sin mem, kiam li pensis pri tio, ke pro terura furioz-atako li mortbatis sian edzinon kaj fileton. Certe ia malamika dio obsedis lin tiam. Nenion li sciis, nenion li vidis, inundis lin la sango, la densa sango kaj li sentis nur la volupton de sia furiozo, la volupton de l' bato sur la mola virina kaj infana karno, kapti! ĉifi! ŝiri! kaj li ne pripensis, ke sola bato de lia monstra mano povas esti mortiga al tiuj malfortaj!

Kaj poste la hororoj de l' resobriĝo, kiam li vidis antaŭ si la du kadavrojn! Li kuŝiĝis apud ili en la polvo, ploris kaj blasfemis, provis ilin revivigi, kisis, palpatis ilin kaj per teruraj vortoj insultis sin mem kaj la diojn. Poste li elkuregis sur la monton, en la arbarojn kaj tie furiozis tutan semajnon. Li radike elŝiris la arbojn, la bestojn mortbatis unu per la alia, kaptinte ilin en la altan aeron kaj malproksimenjetinte ĉion, kio trafis en lian manon. Li mortbatis eĉ homon, kiu okaze alproksimiĝis kaj provis lin pacigi. Ĝis nun akre fiksiĝis en liaj okuloj, kiel ŝprucis lia sanga cerbo... neniam antaŭe tiel li priĝojis, ke li iun mortigis.

Malrapide li trankviliĝis kaj trafis en la malan ekstremon. Stulte, grave, kun morne bovaspekta kapo li iris al la orakolejo, premadante en la mano sian grandan klabon kaj nenian alparolante sur la vojo. Li sentis, ke li devas fari ion, kaj li volis demandi la orakolejon, kion li faru. La pastroj ne donis tuj respondon. Heraklo trovis suspekta tiun ĉi silenton kaj la orakolon, kiu devigis lin al la servo de Eurystheo. Sed estis egale al li. Li iris kaj li lasis sin konduki, kiel celperdinto, milde kaj sen pripenso, ĝojante, ke li havas antaŭ si ian taskon,

ian difinitan agon, danĝerojn, en kiujn li povas sin forgesi.

Kaj de tiam li iras la montojn kaj la densejojn por purigi de sovaĝbestoj kaj monstroj la arbarojn de Eurystheo kaj de liaj amikoj. Nokte li dormas en strangaj kaŝlokoj, tage li grimpas la krutaĵojn, travadas la riverojn, ĝuas sian grandiozan forton kaj atente sekvas la postsignojn de l' gigantaj bestoj.

II.

Luoke la postsignoj de l' Apro larĝiĝis neatendite. La arbaro estis disrompita en kelkpaŝa areo kaj la tero estis frakasita kaj tretita, kvazaŭ la besto estus ekdancinta tie. Heraklo tuj rimarkis la klarigon de la stranga fenomeno: sur la plejrando de l' rompaĵo kuŝis blanka korpo, duone ombrumita de l' foliaro.

Heraklo malrapide proksimiĝis. Junulo kuŝis tie senvive, preskaŭ nude, liaj vestoj estis ĉifone ŝiritaj de liaj membroj. Ĉe la femuro kaj ŝultro li estis vundita.

Heraklo tuj vidis el la koloro de l' sango kaj el lia kuŝmaniero, ke la knabo ankoraŭ vivas. Kaj kiam li kliniĝis super lin, subite varma kompato kaptis lian koron. La vundito estis preskaŭ infano. Liaj delikataj, laktrozaj vangoj tute paliĝis, super lia lanuga mentono sensangaj lipoj strekis mallarĝan linion, liaj longaj, silkaj bukloj kungluiĝis pro la koto kaj sango.

Heraklon kelkfoje kaptis la kompato kaj amo per same subita kaj nemotivita forto, kiel la furiozatakoj. Laŭfunde tiu ĉi giganto estis plena boukoro kaj havis instinktan simpation por la malfortaj kaj mildaj. Li ekkaptis la vunditan knabon kaj portis lin al la fonto. Li estis por li malpeza kvazaŭ floko. Li portis lin, kvazaŭ malsanan infanon, en la lito de siaj brakoj kaj sentis strangan tenerecon je la tuŝo de l' delikata, glata haŭto.

Li atente demetis la knabon kaj lavis liajn vundojn. Li rigardis liajn iom angulkonturajn knabajn ŝultrojn kaj fermitajn okulojn. Li pensis pri sia propra filo, kiun li mortigis. (De tiam ankaŭ li estus kreskinta tia.)

Subite ankaŭ la knabo apertis la okulojn kaj rerigardis al li. Li rigardis, kiel la vekiganta infano, kiu ankoraŭ ne scias,

ĉu li songas aŭ ne? Fine li ekparolis. Per afablaj kaj konfidencaj vortoj li petis akvon por trinki kaj poste li komencis rakonti sian historion. Li babilis senĝene, per voĉo ankoraŭ iom malforta, sed amike kaj kuraĝe. Heraklo ne estis kutimiĝinta al tia infana konfidemo. Ĉiu timis lin, oni parolis al li nur kun estimo kaj ĝeno. Eĉ kiam li havis hejmon: ĉiuj domanoj tremis antaŭ li. Sed al tiu ĉi knabo ne imponis la terura muskolaro, nek la leonfelo, nek la peza klabo.

— Kiu vi estas — li demandis — ho fremdulo, kiu lavis de mi la sangon kaj savis mian vivon? Mia patro certe donos al vi grandan rekompencan, ĉar li estas la reĝo de l' tuta regiono. Ni loĝas tie, en la subo de l' montoj kaj mi vojeraris ĉasante en la arbaro. Nun mi jam fartas tute bone. La terura monstro atakis min kaj preskaŭ forprenis mian vivon. Per mallumo kovris min iu dio. Kiel feliĉa vi estas, ho fremdulo, ke viaj muskoloj defendas vin de la atakoj kaj fortimigas la malamikon.

Kaj kun infana scivolemo li etendis la brakon de sur sia kuŝejo por palpi la ŝvelantajn brakojn de Heraklo.

— Certe vi estas granda reĝo, ho fremdulo! Feliĉaj estas la fortuloj — li ripetis kun profunda konvinkiĝo.

Heraklo aŭskultis lin preskaŭ ensorĉite. La parolo de l' knabo estis facila kaj delikata, babila, kiel tiu de knabino kaj tamen estis en ĝi io simpatie vira.

— Kiel vi nomiĝas, ho junulo, kaj kiomfoje vi vidis freŝan foliaron en la arbaro? — demandis Heraklo.

— Mia nomo estas Hylas — respondis la junulo — kaj mia patrino diras, ke mi ĝisvivis dekok printempojn. Sed mi kredas, ke mi estas jam multe pli maljuna.

Li provadis sian vunditan brakon kaj poplilon, ĉu ili jam turniĝas? Sed li ankoraŭ ne povis ekstari, li devis rekuŝiĝi sur la herbojn. Heraklo serĉis bivakon, kie ili dumnokte povas esti sekuraj. Ne malproksime, inter kalvaj rokoj li trovis groton, kiu estis barikadebla: tien li portis la knabon. Al Hylas plaĉis ĉi tio: ke subite oni nur ekkaptas lin, kvazaŭ malpezan, etan beston: li spiregis kaj ridegis inter la brakoj de l' giganto. Heraklo mortigis sovaĝbeston kaj eligis fajron el ŝtono. La fajro baldaŭ alte flagris kaj Heraklo tenis super

gi grandajn viandpecojn. Estis jam vespero. Je l' viandodoro kaj lumo elvenis la bestoj el la arbaro: tie kaj ĉi tie strangaj, fajraj okuloj emergis el la malluma foliaro. Sed ili ne kuraĝis veni pli proksimem, kiam ili ekvidis la nekutiman flagrantan lumon: ili haltis kvazaŭ sorĉite sur la randoj de l' senarbejo. Nur la flugila armeo de l' papilioj kaj skaraboj cirkulis kun zuma barakto ĉirkaŭ la flamo: la fajra lango kraketante kaptis foje-foje unu flugilon. Granda, ruĝa fumnubo ascendis en la duonlumon. Heraklo donis etajn manĝopecojn al la knabo kaj ankaŭ li mem manĝegis kvazaŭ dio. Hylas senĉese babilis. Li rakontis la historion de sia juneco, siajn unuajn ĉasadojn, li parolis pri la riĉeco de sia patro, pri liaj gregoj, kiujn li tiomfoje gardis sur la deklivaj paŝtejoj en sia etbuba aĝo. Li tute emociiĝis por momentoj, kiam li pensis pri sia vojerariĝo kaj pri tio: kiu scias, ĉu li trovos iam la domon de sia patro? — sed en la sekva momento li jam ree ridis, forgesigante pri ĉio, kvazaŭ li de ĉiam estus ĉasadinta apud Heraklo. Li estis tute hejmece en la bivako de l' giganto. Kaj Heraklon plenigis la sento de mirinda trankvilo kaj kontentiĝo, kiam li apudsidante aŭskultis lin. De longaj tempoj unue li fartis bone ankaŭ sen celo, klopodo kaj batalo. Kaj unue li sentis, ke li ne estas sola. Ankoraŭ neniam estis homo, kun kiu li povis tiel paroli: eĉ lia propra edzino ĉiam nur treme kuraĝis veni antaŭ lin. Tiu ĉi knabo lin tute ne timis. Kaj Heraklo komencis rigardadi kun senmezura tenereco lian palan infanvizagon, liajn saĝajn okulojn, kiuj fulmbrilis nokte kiel la okuloj de juna sovaĝbesto kaj lian vunditan ŝultron, kiu aspektis iel mallerte ĉarme, ŝajnante ĉiufibre tremi trans la varma kaj ruĝa vaporo de l' fajro. Varma amikeco vekigis en li, sento, kiun li ĝis nun ne konis, ĉar li juĝis la homojn nemezureble malsuperaj al si. Lia amikeco estis same subita, forta kaj instinkta kiel lia furiozo. Kaj eksentinte la belecon de l' knabo kvazaŭ senkonscian, sed katenan sorĉon, kun ĝojo li pripensis, ke eble ankaŭ Hylas devenas de la dioj, kiel li mem, kaj ili ambaŭ staras supere de ĉi tiu aĉa tera raso. Ĉar alie kiel povus okazi, ke la knabo lin ne timas?

Sed Hylas iom post iom fermis la okulojn kaj la malforto lin venkis. Heraklo longe aŭskultis lian egalan dorm-

spiradon. Poste li faris barikadon kontraŭ la sovaĝbestoj, disjetis la fajron kaj ankaŭ li mem ekripozis. Grandaj astroj brilis sur la ĉielo, ia stranga hurlo sonis el la arbaro, la disjetita fajro ankoraŭ longe susuretis sur la tero.

III.

La vundo de l' knabo rapide saniĝadis. Heraklo lin gardis, lin defendis de bestoj, portis al li manĝaĵon, ĉion forĝesis pro lia bono. Lian koron penetris granda, varma amo, en kiu li preskaŭ fandiĝis. Ili ne enuis unu la alian. Hylas estis tiel konfidema, ke li iom post iom konatiĝis kun lia tuta vivo, kun ĉiuj liaj pensoj: la knabo ĉiam trovis paroltemon dum iliaj tuttagaj kunestadoj, ĉe la fajro de l' groto, kiam ekstere plaŭdis la pluvo, malpurgrizaj riveretoj malsuprenbruis de la montoj kaj Heraklo ne povis ĉasi en la arbaro. Sed ankaŭ en bela vetero li ĉiam revenadis al la bivako, por ke lia malsana amiko ne enuu, neniam li aventuris malproksimen, kvazaŭ Eurystheo kaj la apro eĉ ne ekzistis por li. Ĉi tiu amikeco kvazaŭ jam alportis la tutan absolvon kaj de nun kvazaŭ estis troe sufiĉa celo ĉasi foje kaj foje beston sufiĉan por la nutro de ili ambaŭ kaj poste rerapidi al la bivako por plu aŭskulti la intiman kaj neelĉerpeblan babiladon, kiu mallaŭte apertis la pordon de tute novaj ĝojoj antaŭ la varma kaj sovaĝa animo de l' giganto.

Li mem pli malfacile reciprokis tiun ĉi konfidemon. Li ne estis lerta en parolo kaj estis penige al li fosadi en la suferoj de sia pasinto. Nur kelkfoje, vespere ĉe la fajro, li intimiĝis tiom, ke per kruda lingvo kaj kun sovaĝaj gestoj li rakontis iun el siaj danĝeraj heroaventuroj. Tiam la okuloj de l' knabo ekbrilis kaj li senkaŝe admiregis Heraklon, kio tre agrable tuŝis la heroon. Heraklo povis rakonti nur kun mangestoj kaj kelkfoje ili preskaŭ aktoris la historion de l' hidro en Lerna, de l' leono en Nemea, aŭ de l' cervo en Keryneia. Ankaŭ la malsana knabo agitis per la brakoj kaj iliaj grandaj, ekscititaj ombroj himere gestegis sur la ruĝa rokmuro.

Nur pri Eurystheo ne povis Hylas kontenti. Indigniĝis lin, ke la poltrona kaj malforta homo komforte vivu en la domo, dum la brava kaj forta estas devigata lukti inter ter-

uraj danĝeroj. Sed Heraklo alie konsideris la aferon. Li eĉ rifuzus tiun molan vivon.

— La homo mem elektas sian vivon — li diris — kaj la dioj laŭ lia elekto ordonas ĝin al li. Ankaŭ min logis la diinoj de l' moleco! Sed mi elektis ĉi tion.

— Kiel potenca homo vi estas, ho Heraklo! — kriis Hylas kun sincera admiro. — Ankaŭ mi volus esti tia, kia vi. Eĉ diri mi ne povas, kiom mi amas vin!

Kiam la knabo plisaniĝis, li akompanis Heraklon al liaj ĉasadoj. Heraklo ne lasis lin iri tre malproksimen, prefere ankaŭ li mem faris pli malgrandajn vojojn, li gardis lin, kvazaŭ li estus lia filo. Dum la vagadoj Hylas rememoris pri sia hejmo, kelkfoje vespere kaptis lin ploro, aliffoje li volis persvadi Heraklon, ke li lasu lin iri al granda vojo por serĉi la domon de sia patro. Li sciis, ke li ja ne permesos tion, tamen pro nura maltrankvilo li pritraktadis ĉi tiun temon kaj pro ĝi ili multfoje tute serioze interkverelis. Kaj tiam kun pasia amikeco ili repaciĝis ĉiam denove kaj poste ili komencis lude eklukti, ili ridegis, ruliĝis sur la tero, kiel du junaj leonoj. Heraklo atentis, ke li ne tro tuŝu sian junan kamaradon, sed Hylas skrapis, mordis, kiel li povis.

Sed la sekvintan tagon la junulo vekigis melankolie kaj ne volis akompani Heraklon al la ĉaso, aŭ li volis iri sola en la danĝeran arbaron. Li plezuris pri la zorgoj de Heraklo pentrante al li, al kiaj aventuroj li volas ekiri — kiujn li kolorigis en sia fantazio — kaj kelkfoje li kuraĝis aludi eĉ tion, ke li tute forlasos la komunan hejmon kaj li ĉasos sola, ĝis li trovos la domon de sia patro. Sed fine li tamen restis pigre ĉe la groto, fajfilon boris kaj iigis el sambuko, kion li lernis de la paŝtistoj de sia patro, tio distris lin dum la tuta tago.

Heraklo ne sciis, kio al li estas. Sed foje li komencis konjekti ion. La parolfluo de l' knabo elĉerpiĝis, li iĝis revema, li rigardis dum la tuta tage la nubojn, la birdojn, la deklivojn de l' montetoj. Poste sen ia kaŭzo venis en lian kapon hejmaj historioj pri servistino de lia patro, kiu faŭnoj atakis sur la kampo, aŭ pri servisto, kiu vidis nimfojn sin bani ĉe la rivereto, kiam li trinkigis la ĉevalidon. Vespere ĉe la fajro li komencis demandadi Heraklon pri knabinoj, li volis

aŭdi de li pri amaventuroj kaj drastaj okazintaĵoj, kaj li ridegis, kiam la giganto peze kaj kun certa pudoro parolis pri tiuj ĉi aferoj. Poste li demandadis, ĉu li vidis jam nimfon? Estas neeble, ke dum siaj longaj arbaraj vagadoj li ne vidis tian. Heraklo vere vidis jam najadojn petole sin bani en akvofalo, ili ŝprucigis la akvon en liajn okulojn kaj lin tute blindigis. Driadon li vidis nur printempe, el malproksimo, sur la eĝoj de l' fruktaj montetoj, danci en mallonga, flirtanta rozkolora jupo; kiam li venis pli proksimen, ree ŝanĝigis la driado en florantan arbon.

Hylas multe revadis pri tio. Ankaŭ li volus vidi nimfon, ĉe li firme asertis, ke li kaptus kaj ĉirkaŭprenus ilin.

— Ĉu vi ne timas de Artemis? — demandis Heraklo kaj rakontis al li la historion de Aktaeon, al kiu la virga kaj kolera diino kreskigis kornojn, ĉar li embuskis pri ŝiaj nimfoj. Hylas ege ridis pri tio, tamen li plu insistis pri sia heroeco, dirante, ke la amo de di-knabino valoras malgrandan danĝeron.

Sed Heraklo komencis grave timi pri la knabo. Okazis, ke la knabo fuĝis el la bivako kaj, dum Heraklo iris serĉi predon, li malproksimen forvadis en la arbaro kaj vespere revenis al la pritima kaj kolera Heraklo kun tio, ke li vidis nimfojn. Poste li pripentris la tutan renkonton, priskribis iliajn korpojn, membrojn, movojn, lia voĉo sonoris varme kiel la sopiro, liaj okuloj brilis kiel la voluptema fantazio. Heraklo iom post iom kredis al li... iom post iom li rimarkis, ke la knabon vere komencis kateni la nimfoj per reto: senkorpaj fortoj virinaj, per reto mistera. Jam ilin vidis Hylas en ĉio. En la delikataj nuboj de l' ĉielo flirtis arĝentaj falbaloj de virinaj vestoj kaj kaŝis la grandan viran sunon. En la kliniĝoj de l' montetoj kvazaŭ sin streĉis fortaj kaj tamen molaj koksoj inaj. Vespere la steloj brulis kiel fajraj kaj misteraj virinokuloj. Ankaŭ la vento flirtigis strangajn, narkotajn inajn odorojn. La densa branĉvesto de l' arboj incite susuris kaj balanciĝis en la peza aero. Foje kvazaŭ iu spiris sur la kolon de Hylas, kelkfoje lian veston ektiris nevideblaj manoj. Kaj la junulo ne kuraĝis deĵeti la veston ĉe la rivereto por bani sin nude en la ondoj, ĉar al li ŝajnis, ke dek kaj dek malsataj kaj virgaj knabinokuloj embuskas post la arboj kaj estas scivolaj pri lia korpo.

Ankaŭ Heraklo mem sentis tion. La nimfoj havis la povon: survesti sekretajn formojn kaj plenigi la tutan naturon, kaj kie ajn Hylas iradis, ĉie lin ĉirkaŭprenis nevideblaj, sed tamen ĉiam sentataj, avidaj kaj bruligaj virinaj sopiroj. La severa Artemis certe nur malofte vizitis tiun ĉi arbaron: ĉi tie bola kaj sekreta voluptemo estis ĉie en la aero, kaj la nimfoj ne timis la punon de Kallisto. La malsataj virginoj de l' Naturo per libera senhonteco sentigis siajn sufokajn kaj densajn sopirojn.

— Oni devas forlasi tiun ĉi regionon — pensis Heraklo kaj atendis, ke Hylas denove rememoru pri la gepatra domo. Sed la knabo ne plu menciis siajn gepatrojn kaj fine Heraklo mem proponis, ke ili kune ekiru kaj ke li helpas al Hylas por serĉi la reĝan palacon de lia patro.

La knabo obeis sen kontraŭdiro, sed ankaŭ sen videbla ĝojo. Ili marŝis sur la deklivo, apenaŭ parolante unu al la alia, sur la pli sekuraj lokoj ili ripozis kaj la sekvintan tagon ili alvenis al la piedo de l' monto. Kiam la maro de l' arbaro videble malprofundiĝis, Hylas fariĝis ĉiam pli kaj pli ekscitita. Li esploradis tien kaj ĉi tien, subite li haltis kaj eklevis la kapon, kiel la hundo, se ĝi trovas postsignon.

— Jen — li diris. — Tiun ĉi pejzaĝon mi jam konas.

Kaj li ekiris firme kaj en rekta direkto. Lia ekscito ĉiam kreskis: preskaŭ vidiĝis, kiel vekigis en l' lia malnova memo kaj kiel ĝi fariĝas pli forta ĉe ĉiu vojkurbiĝo. Sed ili vidis strangajn signojn sur la vojo. Ili jam venis al la arbaro, al la subaj paŝtejoj, sed nenie vidiĝis paŝtisto, nek grego. Kelkaj sovaĝiĝintaj ĉevaloj paŝtis sin malproksime kaj hufbrue fuĝis de ili. Fine ili venis al la ŝirmejo. Sed la tabuloj de l' ŝirmejo kuŝis rompita kaj renversita, la mangujon tenis nur unu tabulo, ĝia fino frakasite pendis en la aero, la ŝirmalo estis malplena. Hylas explore, kvazaŭ flarante penetris antaŭen, laŭ liaj memoroj.

Sed kiam ili trovis la domon en ruinoj kaj malplena: li rigardis ĝin indifere, kvazaŭ tute fremdan domon. La dezerta, detruita, muta loko vekis en li nenian memoron. Li rekonis la lokon de sia infanaĝo, sed nur mense: lia koro restis muta. Heraklo volis lin konsoli, sed la knabo tute ne ŝajnis

trista: pliguste lia vizaĝo respegulis ian grandan sensargiĝon. Li liberiĝis de siaj memoroj, de siaj malnovaj ligiloj, de kiuj li ŝiriĝis tiel rapide kaj facile, kaj kiuj nun, sur la vojo, maltrankvilige komencis reekzisti por li. Nun li faligis ilin, tiel facile, kiel la palmo sian sekigintan, pasintjaran folizonon. Li turnis sin kaj rekte, kun grandaj paŝoj li reiris al la arbaro.

Heraklo enpense paŝadis post li. Li ne komprenis lin, li iris preskaŭ timige antaŭ li kvazaŭ di-knabo. Tamen kun ĝojfrapanta koro li iris post li: nun jam la knabo estos nur la lia, lia amiko, lia infano. Li deziris tion iel esprimi: sed Hylas divenis lian penson kaj subite ekparolis:

— Nun ni iros sur apartaj vojoj, ho Heraklo! De nun ni ne plu ĉasados kune: mi dankas vian komplezemon, sed mi ne povas kun vi resti.

En Heraklo preskaŭ sufokiĝis la animo.

— Kial, Hylas? Kiu prizorgos vin de nun, se ne mi?

Sed Hylas subite premis la manon de Heraklo kaj per sia levita kapo signis al la arbaro:

— Ĉu vi aŭdas?

Heraklo aŭdis. Sufokita ridego sonoris el la foliaro, logantaj voĉoj, strangaj susuroj. Heraklo aŭdis. Li aŭdis kvazaŭ muzikon, muzikon de virinaj spiregoj, zupon de vestoj. Ili estis jam en la voluptema arbaro. Suncirkloj ĵetiĝis, balanciĝis, ŝvebis disĉe, sekrete, kiel rebriloj de foraj dancoj. Arboj malĉaste klinadis sin en la volupto, la tero ŝvelis, la aero fluis kiel varma bano. Kaj ĉie, pli interne, pli interne, la sonoro, la ridego, la glitsusuro...

— Vokas min la nimfoj — diris Hylas mallaŭte, ekscitite.

Kaj li ekiris, rapide, internen, en la sovaĝejon. Heraklo post li. Hylas eĉ ne rerigardis, iris, iris, senvorte, kaj Heraklo post li por defendi lin kontraŭ la bestoj.

— Mi ne povas vin forlasi. — li diris preskaŭ petege, — ĉar kiu defendos vin kontraŭ la bestoj.

Sed la junulo jam videble ĝuis la protekton de la nimfoj. Kien li iris, la bestoj amase disrapidis. La pantero alarmiĝis de sia kuŝejo, gape rigardis per siaj fajraj okuloj kaj ekstreme retiriĝis inter la foliojn je la bruo de la decidaj paŝoj. Hylas nur iris plu, rekte kaj flare, kiel la cervo postiranta sian inon.

Kaj ilin ambaŭ ĉirkaŭprenis la terura, ina arbaro. Fariĝis vespero, densa varma vespero. Luno ne estis, la stellumo ne penetris inter la arbojn. Strangaj spiroj fluadis, sovaĝaj kaj voluptaj okuloj brilis en la densejo. Jen kaj jen branĉo ektiris la veston de l' rapidantoj. Hylas kelkfoje ektremis, kvazaŭ sekretaj kaj varmaj manoj karesus lin. Lia figuro ĉiam pli malhele fandiĝis en la nigron de l' arbaro, sed liajn vibrojn Heraklo eksentis per ia mirinda simpatio: ĉar tiuj ĉi ekstretoj kvazaŭ trakuris la tutan grandan arbaron kaj la arbaro kvazaŭ respondis ilin per la sekreta kaj sopira tremado de ĉiu sia virina forto. La nimfoj, la nimfoj! Heraklo subite sentis, ke la nimfoj estas tie, ĉirkaŭe, malantaŭ ĉiu arbo, ili dancas, plektas ĉenon ĉirkaŭ ili, jubilas en la mallumo, glitas inter ilin, por momentoj kaŝas antaŭ li la figuron de Hylas.

— Hylas! Hylas! — li kriis. Sed Hylas ne respondis kaj Heraklo sciis bone, ke malfrua jam estas ĉia admono, averto: en la junulo jam brulas interne, detruas interne la sopiro je la virino, la potenco de l' nimfoj, tiu sekreta, malamika virina forto, kiu inundas la tutan arbaron, la teron, la arbojn, kiu inundas ĉion! Li pensis pri sia propra vivo, pri siaj renkontoj kun la virina forto, pri sia edzino, nun jam li komprenis ĉion, komprenis la grandan malamikan inecon, kiu logis el li la grandan Furiozon, pro kiu li mortigis la virinon kaj sian infanon, la propran infanon!

— Hylas! Hylas! — li kriis ĉiam pli langvore, pli malfide. La junulo ne respondis, ne turnis sin, eĉ ne vidiĝis jam, nur liaj rapidaj paŝoj aŭdiĝis kaj poste eĉ tio ne. Ĉu li eble haltis? Heraklo ekscitite marŝis antaŭen kun siaj grandegaj paŝoj por atingi la rapidanton. Li faris kelkajn paŝojn kaj tiam ekbatis lia koro: Hylas nenie montriĝis. Heraklo haltis kaj ekaŭskultis. Ŝajnis al li, ke li aŭdas la spiron de Hylas. Kun premiĝanta koro li iris post la sono. Tiam li aŭdis disflugojn, ian vekiĝon el malproksimo, ridegon, dancan glitsusuron sur la tero, silkajn flugilbatojn. Denove li haltis kaj ĉirkaŭrigardis. Nenio. Nur la mallumo zumas kaj spiregas ĉirkaŭe. Du varmegaj okuloj brilas el ie, ia nevidebla besto ŝiras sian predon, dolore-volupta ĝemo de pariĝantaj bestoj aŭdiĝas de pli proksime.

— Hylas! Hylas! — krias Heraklo sufoke kaj terurite. Je lia voĉo amaso da birdoj ekflugas kaj pli malproksime la ekflugoj onde ripetiĝas. Teruran ĥoron frapas la volupta kaj kruela arbaro. Heraklo trarompas dekstren, kie ŝajnas al li lumo inter la branĉoj. Senarbejo estas tie. Kaj la luno ĵus ascendis, inundante la pejzaĝon per sango, kiel heroa konkeranto. Kaj en tiu ĉi sangruĝa lumo Heraklo ankoraŭfoje, due ekvidis la nimfojn. Ili disflirtis sur la randoj de l' senarbejo en ŝaŭmpezaj, travideblaj vestoj, ridegante. Poste ili preterdancis malantaŭ la giganto, subite, mokeme, sed kiam li rerigardis, ili jam malaperis.

Ili estis, kiuj forrabis la junan Hylas.

IV.

— Hylas! Hylas! — kriis Heraklo kaj per sia voĉo alarmis la arbaron. — Hylas! — Nun, kiam li atingis al la libera senarbejo, al la lunlumo, li liberigis sin de la katenanta sorĉo kaj lia voĉo trarompis sub la malproksiman ĉielon, kiel sovaĝbesto el la malforta kaĝo. — Hylas! Hylas! — Respondis hurlo de ŝakaloj, strangaj bojadoj, blekoj, birdokriĉoj. — Hylas! — La arbaroj transdonis la voĉon unu al la alia, metale sonoritis la suproj, sed el la proksima foliaro kvazaŭ pli teneraj nimfovoĉoj ripetis, flustris, ĝemis, kantis, krietis: — Hylas! Hylas!

Dum du tagoj kaj du noktoj serĉis Heraklo pri Hylas. Teruraj tempestoj tramuĝis lian animon. Kiom valoras la vivo, kiom valoras la forto? Feliĉa estas, kiu amas nur sin mem, sed la homo estas simila al la arbara kreskaĵo, kiu ĉiam palpadas al la najbara kreskaĵo per siaj sarmentoj. Ho ve, kiel kunkreskis la plantoj kaj kiom nesufiĉa estas ĉiu por si mem! Ili kunkreske kroĉiĝis unu al la alia kaj al la humo, kaj al la aero, ĉielo kaj tero, kaj la tuta mondo estas dolora ĉeno. Kaj ĉiam ŝiriĝas ie tiu ĉi ĉeno: kaj ĉiam doloras pro tio la tuta, kruele kunplektiĝinta Ĉiomo. Ĉu esti sola? Sed ĉu la vivo havas sencon, ĉu ĝi havas celon, se oni estas sola? Ĉu la vivo entute estas vivo, se oni estas sola? Unu korpo estas la tuta mondo kaj ĉiu disiĝo estas nur vundo sur la korpo de l' mondo.

Kaj Heraklo kriegante kaj dolore travagis la abruptojn kaj serĉis sian amikon Hylas. — Hylas! Hylas! — Dum du tagoj kaj du noktoj la arbaroj ehis liajn kriadojn, ĝis fine lace kaj afliktite li venis al la groto, kie ili loĝis kune. Tiam lia doloro kaj furiozo reakriĝis kun renoviĝinta forto. blasfemante li vokis la nimfojn, la malicajn dimojn, kiuj embuskas pri la amiko de l' Homo. Kun volupta fantazio li imagis, kiel li traktus la nimfojn, se ili trafus en liajn manojn: kiel li volvus ilian hararon ĉirkaŭ sia pugno, kiel li batus ilian perfidan kaj molan bruston. Sed li sciis bone, ke ĉio ĉi estas vana: ĉar la nimfoj ne estas mortemaj estaĵoj kaj ne estas solaj: ili plenigas la tutan Naturon kaj ilia potenco estas pli ol tiu de unu homo, eĉ se eble naskita de dio. Tial por la homo restas nenio krom la doloro kaj por la nimfoj la kruela volupto, kiu stulte rigardas en la arbaro.

La giganto ploregis en la groto plena de intimaj memoroj, kvazaŭ furioza kaj senpova infano: poste li ekiris de tie. Sed li ne iris eksteren al la lumo, sed internen, en la sekretajn profundojn de l' groto, kiuj ŝajnis ĉiudirekte etendiĝi kaj diverĝi en la senfinon. Li serĉis la mallumon en sia malespero. Ĝis fine li eĉ ne sciis, ĉu estas tago aŭ nokto: palpadante li iris en la mallarĝaj koridoroj kaj kelkfoje li devis profunde sin kurbigi, ke li povu paŝi sub la kristaliĝintaj rokoj.

Li mem ne sciis, kiom da tempo li vagadis malsate-soife en la malluma groto. Kelkfoje li kriis la nomon de Hylas. senespere, nur por hardi sian doloron en la eĥo de la vastaj kavernoj. Fine li vidis lumon krepuskantan defore. Li venis en grandan rokĉambregon, sur kies transa fino muĝis la maro kaj frapadis la rokplandon de l' groto. De tiu flanko venis la lumo: vasta pordego faŭkis tie, tra kiu oni povis vidi segmenton de sunbrila kaj lazura maro. Mevoj gaje flugfrapadis post la aperturo kaj en la fono de l' sunbrilaj akvoj la blankaj birdoj ŝajnis tute malhelaj al la lummalkutimaj okuloj de Heraklo, rigardanta el la malluma groto.

Sed antaŭ la granda aperturo, malhele en la lumo, staris stranga, dika kaj groteska, vivanta figuro. De la tero ĝis la brusto ĝi ŝajnis grandega ĉevalo, turnanta al Heraklo sian fortan postajon, kium ĝi ventumis per sia granda, tufa vosto. Sed

supren de la brusto, kvazaŭ de zono, kiun signis mallarĝa harkrono, sin levis muskola homa dorso kun granda hirta homkapo. Ĝi suprentenis siajn dikajn brakojn, levis ian argilvazon al la buŝo kaj reklininte la kapon ĝi trinkis el ĝi avidajn glutojn. La krudan konturon de l' haraj brakoj kaj la harzonon sur la du flankoj de l' kokso kaj la grandan hararon, kiu flirtis en la mara vento inundanta tra la aperturo, la suno orumis, kiel la randon de nigra silueto.

Je la pezaj paŝoj de Heraklo returnis sin la stranga kreaĵo, forprenis de la lipo la ventran vazon, sed nur tiom, ke li liberigu la buŝon kaj povu ekparoli:

— Kiu vi estas, ho Homo, kiu kuraĝis penetri en miajn vastajn grotojn? — li demandis, kaj Heraklo respondis per ehantaj vortoj:

— Mi estas Heraklo, mi travagis multajn landojn kaj venkis multajn bestojn kaj mirindajn estaĵojn. Mi estas la plej glora el la homoj kaj mi devenas de dia Generinto.

Respondis la monstro:

— Kaj mi estas Pholus kaj miaj patroj el la fama familio de l' kentaŭroj. Venu pli proksimen, ho Homo, kaj gustumu la dian vinon, el kiu mi donos al vi gastdonace. El la fama nupto de Pirithous kaj Hippodamia predis ĝin la fortaj kentaŭroj kaj portis kun si en la ventozajn grotojn, en dek ses felsakoj kaj samnombraj amforoj. Sed Pholus estis saĝa, ĉar li kaŝis de siaj kamaradoj la felsakojn kaj retiriĝis kun ili ĉi tien, en la apudmaran groton, kie ili ne trovos lin. Nun li mem trinkos la vinon, kun siaj gastoj, kiujn li mem elektos por si: trinku, ho Homo!

Kaj li tenis antaŭ lin la argilvazon.

Heraklo antaŭe verŝis iom sur la teron por la dioj kaj poste prenis al la lipo la flavan trinkaĵon, kies pezan, dolĉan aromon li sentis de malproksime per sia mirinde evoluinta ĉasflara instinkto. Grandajn glutojn li trinkis el ĝi kaj li tuj sentis konfuziĝi la kapon pro la efiko de l' forta vino.

— Venu pli proksimen, ho Homo! — kuraĝigis lin Pholus.

Ili sidiĝis unu kontraŭ la alia kaj jen la unu, jen la alia prenis al la lipo la vastan argilvazon. Ĝis vespero ambaŭ iĝis

ebriaj. La okuloj de l' kentaŭro vualigis, liaj brakoj faris strangajn, malsobrajn gestojn, sovaĝaj, abruptaj vortoj venis el lia buŝo. Kelkfoje li provis kanti per raŭka voĉo kaj lia kanto estis, kiel la bruo de l' tero dum tertremo. Kaj kelkfoje li fandigis en strangan sentimentalecon, li interkisadis kun Heraklo kaj liaj larmoj gutegis.

En la groto la ombroj iĝis ĉiam pli longaj, la maro venis ĉiam pli proksimen kun la vespera tajdo, ĝiaj ondoj plaŭdante frakasiĝis sur la rifo, la akvo malproksime iĝis sanga pro la subiranta suno. La enhavo de l' granda vazo jam preskaŭ elĉerpiĝis. Pholus ruze palpebrumis al Heraklo, li ne devas timi: estas ankoraŭ sufiĉe el la kara trinkaĵo. Liaj okuloj brilis vezike. Malrapide, malcerte li ekiris kun la argilbotelo al la pli mallumaj koridoroj de l' groto. La giganto sekvis lin kun ŝanceliĝantaj paŝoj. La grotloĝanta kentaŭro sentis sin hejme en la mallumo kaj liaj okuloj bone vidis, kiel tiuj de l' tigroj. Sed Heraklo devis palpadi kaj tion, kien turniĝas la vojo de lia gvidanto, li konjektis nur el la senĉesa bruo, kiun faris la trotado de l' kentaŭro kaj la longa vosto, senĉese frapadanta liajn flankojn. Jen tien, jen tien zigzaxis la groto. La muĝo de l' maro mallaŭtiĝis iom post iom kaj alia muĝo plifortiĝis antaŭ ili: oni estus povinta kredi, ke ankaŭ sur tiu flanko estas maro. Sed la spertaj oreloj de Heraklo rekonis la branĉozumon, kiu ĉi tie estas same eterna kaj ĉion kovranta, kiel la bruo de l' ondoj sur la maro. Baldaŭ en malgranda segmento de l' mallumo kelkaj sovaĝaj fajropunktoj flagris antaŭ ilin: la liberaj steloj de l' malproksimo. Ia maldika besto glitis preter la muro, alarmite de l' resonantaj hompaŝoj; kaj vespertoj flugis frote super la buŝego de l' groto. La malsobran kapon de Heraklo bonfare ekfrapis la varma, sed freŝa aero, kiun milionoj da sufokaj folioj spiris en lian vizagon.

Li ĉirkaŭrigardis kaj serĉis pri Pholus. La monstro aperis el malluma flankniĉo, kun larĝa ridaĉo, portante grandegan felsakon, kvazaŭ sakfajfilon, kaj rulante antaŭ si piedbato alian vinujon, lignobarelon.

— Helpu, ho Homo! — li ĝemis mallerte, ĉar lia korpo estis peza kaj senelasta. Heraklo starigis la barelon en la antaŭo de l' groto kaj elbatis la supran tabulon. La kentaŭro

fleksis siajn antaŭajn genuojn kaj malsuprenigis sian homan parton apud la grandan barelon; lia dorso kaj postaĵo mallerte turis post la genuanta antaŭparto. Sian grandan lipharan kapon li ŝovis en la densan trinkaĵon kaj ĝin sorbis, kiel liaj ĉevalidparencoj la mildan akvon de l' lagoj. Kelkfoje li suprenrigardis kaj ekkriis ege.

V.

La vigla flarinstinkto de Heraklo priatentis la arbaron. Estis blinda, senluna nokto. La denso de l' arbarego ŝajnis ununura nedismetebla amaso kaj malpli sperta okulo apenaŭ estus rimarkinta, ke la mallumo havas kernon. Sed Heraklo vidis grandajn, senformajn figurojn flankumi malantaŭ la foliaroj. Ili ŝajnis gigantaj bestoj, sed la akraorela ĉasisto rekonis en ilia bruado ion homan: en la intencemo, ke ili volis eviti ĉiun bruon kaj en la mallerteco, ke ilia granda korpo tamen ek- kaj ekkrakigis la foliaron kaj post ĉiu krakado sekvis timigita silento. La kapojn ili tenis en nekutima alteco kaj ilia trunko estis strange rekta. Heraklo iom post iom rekonis: ili estis kentaŭroj. Mallaŭte li atentigis la enforĝesigintan Pholus, Pholus ekstampfis: liaj genuoj du- trifoje ekfleksigis, ĝis li povis leviĝi el sia stranga pozicio. Liaj tigrookuloj esploris la mallumon kaj lia vizaĝo ekbrilis:

— Nessus! — li kriis — Nessus! Khiron! — Tiu ĉi ja estas Nessus kaj Khiron, bonaj kamaradoj! — Venu kamaradoj, Pholus gardas vinon ankaŭ por vi! Pholus havas multe da vino! Li havas multe-multe da vino, tiel ke li povus trinki ĝin ĉe la teron! Sed li ne donas al la aliaj fieraĉaj kentaŭroj: sed nur al vi, ĉar vi ekflaris ĝian odoron, hahaha! Venu, venu! jen jam Heraklo, kiu devenas el la gento de l' Homoj, sed estas forta kiel la kentaŭroj. Venu, ĉar tiel gajas la amuzado, se multaj ĉeestas! Mi amas Nessus, ĉar li estas ruza kiel la serpento kaj mi amas ankaŭ Khiron, ĉar li scipovas la muzikon kaj scias rakonti malnovajn historiojn.

La kentaŭroj kolektiĝis ronde ĉirkaŭ la barelo. Ankaŭ aliaj venis, kvin-ses kentaŭroj, inter ili ankaŭ bubo, kentaŭrido kun helbrunaj korpharoj kaj stranga, nematura voĉo. La kentaŭroj ĉirkaŭstaris la barelon, kiel la ĉevaloj la manĝujon

en la stalo. Heraklo, starante en la mezo, ekkaptis la pezan barelon kaj levis ĝin ĝis la buŝa nivelo de la kentaŭroj. La monstroj drinkis samtempe, plenbuŝe, sorbŝmace, mergante sian duonvizaĝon kaj siajn grandajn lipharojn. La trinkaĵo rapide elĉerpiĝadis, fine jam nur ope ili povis trinki. Tiam ili laŭvice transdonadis la ventran lignan vazon kaj ĝin elŝiris reciproke el la manoj, ĝis en ĉiu okulo brilis ebrio.

— Trinku ankaŭ vi, homo! — kriis Pholus, enbatante la supron de nova barelo.

Heraklo facilgeste levis ĝin al la lipoj, kvazaŭ grandegan glason. La kentaŭroj murmuris laŭde, ili tuj favore akceptis Heraklon. Pholus dume disdonis la vinojn plue. La kentaŭrido fendis pro mallerteco felsakon kaj la nektaro disfluis sur la tero. La mastro furioze atakis lin:

— Stultulo! — li hurlis — vi ne ricevos pli! — kaj li staris ĵaluze antaŭ la groton, ke la aliaj ne povu ŝteli la sekreton de la kaŝejo. Sed ili ĉiuj jam estis ebriaj; la hufaj gamboj de Belus fleksiĝis kun granda bruoj kaj li sternis sin sur la tero, la aliaj ekscitite piedbatadis per siaj senhufferaj piedoj, ili deziris sekvi la ekzemplon, sed ili sciis, kiel malfacile estas sin levi al la kuŝanta kentaŭro.

Khiron fiere montradis siajn hufferojn, por kiuj li vagadis malproksimen, ĝis la forĝisto de l' homloĝata vilaĝo. Li estis tiu el la kentaŭroj, kiu plej multe komunikis kun la homoj, multfoje li kaptis la filojn de l' homoj dum iliaj solaj vojoj, instruis ilin muziki, aŭ rakontis al ili la historiojn de l' dioj kaj la batalojn de l' titanoj. Li estis saĝa kaj konis la sekretajn voĉojn de l' naturo, konis la vivon de l' ŝtonoj, kaj sciis paroli kun la krudaj nuboj. La kentaŭroj postulis de li muzikon. Khiron havis strangan, septuban fajfilon kaj li sciis logi el ĝi murmurajn, plorajn, flatajn kaj ĝemajn sonojn. Heraklo narkotite aŭskultis la strangan muzikon, kiu ploris kiel pariĝanta besto kaj stertoris kiel agonianto. Li havis kapturton kaj la gusto de l' vino fandiĝis en li kun la sono de l' muziko. La ebriaj kentaŭroj frapis la sovaĝan takton per diboĉaj gestoj. Iu el la fendita felsako streĉis tamburon sur la malplena barelo. El la klabo de Heraklo ili faris tamburfrapilon. La kentaŭrido gapis kun malfermita buŝo. La arbaro ŝajne atentis la

arbaran horon. La noktaj bestoj ravite tumultigis ĉirkaŭ la muzikon. La strigoj ululis. Pholus rekomencis la diboĉan kanton. La fajfilo lamentis, gargaris, henis. Strangaj birdvoĉoj respondis el la granda mallumo. Terura hurlo aŭdigis. Heraklo volis ekflamigi fajron por fortimigi la bestojn. La kentaŭroj mirante lin rigardis, kiam li serĉis branĉaĵon. Ankaŭ Khiron prenis de la buŝo la fajfilon. Heraklo atentigis lin pri la danĝera mallumo: sed Khiron lin trankviligis:

— La kentaŭroj naskiĝas en la grotoj de l' montoj — li diris — kiel la riveroj kaj fontoj, kaj ili sentas sin hejme en la mallumoj de l' naturo. Se la kentaŭr-patrino sentas proksimiĝi sian horon, ŝi retiriĝas kun sia ŝarĝo en la sekretajn kaŝejojn de l' tero kaj tie naskas kaj edukas sian idon, sub la profundaj arkoj. Tiel ni iĝas parencaj al la tero kaj al ĉio, kiun la tero naskas kaj ni ne timas la bestojn. La kentaŭroj estas nepoj de Ixion, kiu estis filo de l' Tero kaj amumis kun la galopantaj nuboj. Ni estas fortaj kiel la grota leono, pli rapidaj ol la sovaĝa ĉevalo kaj pli saĝaj ol la homo.

— Trinku ho Homo! — alkriis lin Pholus kaj jam kaptis la barelon. Kaj ree ekploris la fajfilo. Sed la kentaŭroj komencis la festenon. Iu kaptis bojantan ŝakalon, kiun la muziko logis tro proksimen. Li kaptis ĝin nur per la brako, kun mirinda instinkto, kiu estis tute fantoma en la mallerta korpo. La kentaŭroj disŝiris la malbelan sovaĝbeston. Ili manĝegis la krudan, sangan ŝakalviandon. La ruĝa saŭco fluis de ilia lipharo tra ilia kubuto. Ili trinkis post ĝi vinon, glutegis, novaj kaj novaj bareloj doniĝis el la kaŝejo. La diboĉo memorigis ilin pri la Nupto, de kie ili rabis la vinon.

— Khiron rakontu ĝin! — kriis la kentaŭro.

Kaj Khiron komencis la historion. Sed ili jam ne povis paciencie ĝin aŭskulti, ili interrompdis lian vorton, ridaĉante menciis la nomojn de la lapithoj, Pirithous kaj Hippodamia, la fianĉinon, la freŝdatan reĝinon, kies korpon ili amis en morton. Hej, haj! jen estis la diboĉo! La kentaŭroj laŭdis la vinon kaj knabinojn de l' homoj. Tiam ili rimarkis, ke la amuzado ne estas perfekta.

— Knabinon oni bezonus! — kriis Nessus akre. Unu, du, tri, neniu sciis, de kie, trafis tien ankaŭ knabinoj. Kvazaŭ

kreskinte el la tero ili stariĝis senhonte antaŭ la kentaŭrojn, eĉ konjekti oni ne povis, ĉu ili estis knabinoj de homloĝataj vilaĝoj, aŭ sovaĝaj kreaĵoj de l' arbaroj. Kun strangaj movoj ili palpadis la kentaŭrojn, per dolĉaj okuloj ili gapis al ilia ĉevalkorpo. Khiron rekomencis la fajfadon. Kun voluptaj ruktadoj ŝprucis la sono el la kantuboj. »Pli saĝaj ol la homo« — pensis Heraklo. La kentaŭrido faris sovaĝajn saltadojn, liaj piedoj ekglitadis sur la roka fundo, stampfe trote saltan dancon li komencis. Dancis ankaŭ la virinoj. En sovaĝa takto akris la fajfsono. Iu virino fleksis siajn molajn kaj varmajn femurojn al Heraklo. En Heraklo superversiĝis la sango; lia ebria kapo memoris dum momento pri Hylas, li hezitis, ĉu li mortigu aŭ brakumu la virinon? Fine li sternis ŝin sur la teron. — Tam, tam — gongis la tamburo sur la plando de l' barelo. — Tram, tram — trotis la dancantaj hufoj. Pholus ekriis. La virino laŭte spiregis sub Heraklo. — »Jen, jen, jen la sola, kio estas!« — pensis Heraklo. Iu kentaŭro per ŝaŭmanta vino aspergis la knabinojn. Grandaj ridegoj aŭdiĝis. El la arbaro esploradis kentaŭrino kun malhelaj kaj ĵaluzaĵaj okuloj. Sopirante ŝi etendis siajn longajn brakojn, sian tutan hom-kaj ĉevalkorpon. La kentaŭroj amis la homknabinojn! La virkentaŭroj amuziĝis kun la homknabinoj! Ili eĉ ne rimarkis la kentaŭrinon. Per siaj grandaj, harozaj manoj ili palpadis la ŝvelantajn formojn de la homknabinoj. Kaj la knabinoj petolbarakte kroĉis sin al la groteskaj korpoj. Iu el ili rampis sur la dorson de Khiron. La kentaŭrido baŭmis alten sur siaj postaj piedoj kaj kapte levis knabinon. La sobriĝanta Heraklo mire rigardis siajn terurajn amikojn. En lia animo kirligiĝis terura haoso. La flava vapore de l' vino vualis antaŭ li la mondon. La sanga amuzo de l' monstroj, la knabinkorpoj, la kentaŭrino, la kolosa muĝo de l' arbaro, noktaj birdoj kaj foraj bestvoĉoj, la malseka alkohola odoro, glataj femuroj, sovaĝaj krioj kaj voluptaj spiregoj en sola, nedisigebla maso bolis kaj fermentis en lia cerbo. Kaj ĉio, ĉio, lia tuta mondo, lia tuta esto implikiĝis en tiun ĉi gigantan nodon de volupto kaj ebrio kaj naŭzo, kaj ĉio kroma, memoroj, pasintoj, tristoj, malproksimoj: kvazaŭ malaperis, disnebulis en senkorpan sonĝon... restis nur la korpo, lia giganta korpo, kun siaj amasaj sentoj, vizioj, vol-

uptoj, ebrioj kaj svenoj. Hylas? Kie estis jam la tagoj, kiujn li pasigis kun Hylas? ili terure retroglitis en la senfinajn profundojn de l' tempoj, kvazaŭ antaŭmiljaraj, kvazaŭ neniam efektivaj. Ankaŭ la junan korpon de Hylas — ekfulmis subite en lia cerbo — en kian ebrion, en kian volupton, en kian svenon enplektis de tiam la nimfoj? Kiom valoras kroĉigi unu al la alia kaj kiom valoras kroĉigi al la pasinto? kiam la dio de l' Nuno muzikas sur nia korpo kiel sur violono! »Pli saĝaj ol la homo« — pensis Heraklo pri la kentaŭroj kaj rigardis la potencajn estaĵojn, kiuj ĉiam obeeme fandiĝis en la grandan ludon de l' estantaro, li sentis, ke ili estas unuj kun la tero, kun la arboj, kun la roko, kun la forto de l' montoj, kiu donas la vinon: kaj en iliaj membroj viviĝis la volupto de l' obskura Naturo.

— Pli saĝaj ol la homo! — Hura! — kaj Heraklo ĵetis sin en ilian diboĉon. Li stumblis en sanglaĝetoj, ruliĝis sur virinoj, orgiis kun la monstroj, verŝadis vinon. Kaj la sceno de l' orgio estis kiel sovaĝa batalkampoj. La kentaŭroj kuŝis dise, zorgante jam pri nenio, ili knedis sub siajn larĝajn femurojn tiun kaj tiun virinon. Huj, huj, kaj tiam leviĝis la lunlumo! Huj, huj, teruraj jubiloj ĝin salutis. Kaj subite eksonis la arbaro. Jen tie, jen tie ĉi, ĉirkaŭe en ĉiu direkto teruraj, nekonataj kentaŭroj galopis, piedbruis minace al la groto. Kvazaŭ kreite de la lunlumo subite ili ekfulmis el la mallumo, gigantaj figuroj, subite ektondris la bruoj de iliaj hufoj, subite rompiĝis, subite krakis la grandaj branĉoj kaj trunkoj per la forto de iliaj brakoj. Iliaj nazoj flaris, ili venis al la vin-odoro. Sovaja batalkrio tremigis la foliaron. La muskoloj de Heraklo subite streĉiĝis, liaj nervoj vekigis. Huj, huj, kio estos ĉi tie? Ĉirkaŭ li la ebriaj monstroj malespere penadis eksalti. Pli saĝaj ol la homo? La ŝtono glitis el sub iliaj hufoj, en la artikoj kaj genuoj misfleksiĝis iliaj piedoj, disbatis fajrerojn, stampis la teron, la kuŝantajn knabinojn. Freneze baraktis la pezpezaj korpoj. La knabinoj terurite sin ordigis, kriete rifuĝis en la groton. La kolera Pholus per du brakoj desiris teruran rokon kaj blinde ĵetis ĝin al la neatenditaj gastoj. La roko disduigis grandan arbon, branĉoj krakis, la tero disŝprucis, kie ĝi falis. La atakantoj iom ektimis. Tiam la

diboĉantoj faris fortikaĵon. Kun subita sobriĝo ili kaptadis la grandajn ŝtonojn por meti ilin unu sur la alian. La sieĝantoj malrapide proksimiĝis, ĉar ili ne havis defendbastionon. Pholus denove ĵetis ŝtonojn, unu rompis la torson de iu kentaŭro. Estis terura vido, kiam li falis morta en la obtuza lumo del' luno. La luno atendis, rigardis la batalon, trankvile, kiel reganto. Blankpeltaj, junaj nuboj rapidis apud lin kiel gardistoj.

Fine komenciĝis la sieĝo. La atakantoj de ĉiu flanko samtempe tumultis kontraŭ la ŝtonfortikaĵo: ŝajnis, ke la tuta arbaro ekmoviĝis al batalo. Sed la avantaĝo estis ĉe la flanko de la defendantoj, ĉar la sieĝantoj ne havis ŝtonojn en manproksimo, ke ili povu ĵeti ilin defore. Kaj el la fortikaĵo jam tuta ŝtonpluvego falegis sur ilin. Malvarma timo inundis ilian ebrion; ili ŝiris, rompis la rokon de sur la muro del' groto. Ili ĵetis per granda forto, sed mallerte kaj la ŝtono falis jen pli proksime ol la celo, jen eĉ tro malproksime, kaj ĝi frakasis nur la arbaron kaj la teron.

Kaj Heraklo serĉis sian sagujon. Li elektis sagon, malgrandan, sed venenitan sur la pinto kaj ekstaris malantaŭ la improvizita bastiono, streĉante la arkon. Oni apenaŭ rimarkis lin inter la teruraj kriadoj. La atakantoj jam venis tiel proksimen, ke oni povis kompreni ilian voĉon kaj tiam komenciĝis la vortbatalo, lukto de tondraj, kriĉaj, hurlaj besthomaj voĉoj. kiuj alarmis la tutan arbaron kaj timigis je morto la povrajn birdojn. Dume aŭdiĝis sur la tero terura krako de ĵetita roko, veado de rompitaĵoj kaj en la paŭzoj la timigita plorpepado de la knabinoj el la groto. Heraklo malrapide celis; la kordo eksonoris kaj la vergo forglitis. Iu monstro renversfalis morta, la eta vergo trafis lin. Pholus kaj liaj kamaradoj gapis kun senmezura miro. Heraklo denove kaj denove celis. Ĉiu pafado de l' venenita sago estis morto. En la vicoj de l' atakantoj ekestis granda konfuzo. Furiozaj kaj mortaj sibiladoj sonis. La grandaj ĉevalkorpoj ekbremsis, retiriĝis, serĉis rifugejon. Sed ili ne ĉesigis la sieĝon. Grandegajn arbtrunkojn ili amasigis unu sur la alian, konstruis terremparojn. Sajne ili kondamnis je malsatmorto la kentaŭrojn kaptitajn en la groto. Kelkaj iris pli malproksimen, al la alia flanko de l' roko kaj alportis de tie ŝtonojn. Baldaŭ la ŝtonoj faladis eĉ post la fortikaĵon,

oni devis retiriĝi pli internen, en la groton plenan de vinvaporoj. Amara sobro obsedis la ebriajn monstrojn, ili stampfadis kiel sovaĝiĝintaj ĉevaloj, piedbatadis la vekriantajn knabinojn, sed la vinon ili ne eldonis: ili defendis ĝin kun besta obstino.

La lumo ree kaŝiĝis, oni ne povis vidi, ne estis inde malŝpari la sagojn. Silentiĝis la nokto, nur krakado aŭdiĝis foje-foje, ia vekrio, ia terura hurlo. La celo de l' atakantoj estis la ŝtonbastiono, iu el ili trafis ĝin per granda roko, tiam aŭdiĝis bruoj de granda tertremiga falego. Poste ree silento, ĉirkaŭe la arbaro spiregis, grandaj akridoj muzikis.

Dum la tuta nokto daŭris la sieĝo. En la mallumo oni ne povis eĉ konjekti, kiuj mortis kaj kiuj vundiĝis. Matene, kiam ekkrepuskis, Heraklo stariĝis kun la pafarko al la bastiono. Ŝirita vualo kovris la montojn, tie kaj tie ĉi elbrilis la arbaro, kvazaŭ ĝi malrapide apertadus la okulojn kaj timus la malamatan tagon. Dormeme palpebrumis la mondo. La ĉielo estis laktkolora, kun malpuraj nuboj, kaj en ĝi cirkulis grandaj, seriozaj monedoj en mezuritaj arkoj. Estis malvarmete, ia frostanta tremo sidis sur ĉio, la nimfoj kaŝis sin sub la nebulojn. Granda abio en la proksimo pene disstreĉis siajn rektajn branĉojn kiel krucumito. La malamiko latentis kaj oni ne sciis, ĉu ĝi ĉesigis la sieĝon? Neeldirebla malpleno ŝvebis super la tuta pejzaĝo. En la buŝo de Heraklo estis misa gusto, liaj okuloj brulis. Li returniĝis. La kentaŭroj malrapide trotadis en la barita korto de l' groto: kaj pli interne, sub la pendanta roko, la virinoj dormis kun nuda, frostanta haŭto kaj malbele disjetitaj membroj kaj plende ili ĝemis dum sonĝo. La teron kotumis vin- kaj sanglagetoj. La kentaŭrido vomis kun terura bruoj en la angulo de l' groto. Heraklo mishumore rigardis la sovaĝajn kamaradojn — »bestoj«, li pensis. Kaj li estis ege malkontenta pri si mem, ke li estas inter ili. (Aŭror-diino levis sian severan lampon.) Liaj manoj premadis la pafarkon kaj la tuŝo de l' homa ilo subite plenigis lin per ĉiu konscio kaj per ĉiu honto. La malŝparita tempo, la neplenumita laboro, la malnova peko, pro kiu li ankoraŭ ne pentofaris, rigardis lin de ĉie el la riproĉo de l' krepuskanta mateno. Neeldirebla malpleno ŝvebis super la tuta pejzaĝo — tie kaj tie ĉi, inter la arboj, disfluis la pala vizaĝo de Hylas...

Li ne havis tempon por multe pripensadi. Malamika kentaŭro aperis de post iu dika arbtrunko. Kun senkonscia viglo li levis je li la pafarkon. La grandega figuro falis kun terura ĝemo. Pholus kaj liaj kamaradoj, — kiujn la misaŭgura silento de l' nokto faris konfuzitaj kaj senkonsilaj — triumfe ekkriis kiel saviĝintoj. Huj, huj!ree komenciĝas la batalo! ili jam ree estis en sia elemento. Kaj ili ĉirkaŭstaris Heraklon, la mirindan estaĵon, kiu scias mortigi per eta vergo. Ili prenis la sagujon de liaj ŝultroj, scivoleme palpatis la sagojn. La heroo trankvile rigardis ilin kiel plenkreskulo la infanojn. Sed Pholus subite ekhurlis. Li vundis la manon per sago kaj sentis teruran doloron. Terure mordis lin la kruela veneno, per kiu Heraklo hardis la pinton de l' sago. Lia brako dum kelkaj minutoj ŝvelis blua: sovaĝaj tremoj trakuris lian tutan korpon, li furiozis kaj piedbatadis pro sia doloro. Liaj kriadoj alarmis la arbaron kaj de post la arboj aŭdiĝis suspektaj moviĝadoj.

Nessus kaj la aliaj rigardis kun kreskanta eksciteco la baraktadon de sia suferanta kamarado. Ia stranga, preskaŭ korpa kontakto ŝajnis esti inter ĉi tiuj kuriozaj kreaĵoj de l' naturo, ĉiu sento samtempe trakuris ilin, kiel ĉevalaro alarmiĝas pro ektimo de ununura ĉevalido. Kun besta instinkto ili sentis siajn dolorojn reciproke. Nun ilia kolero turnis sin kontraŭ Heraklo kaj per ekscitita gestado ili ĉirkaŭis la filon de l' Homo, kies armilo tiom terure vundis ilian kamaradon. Ili ne povis imagi, kiel povas kaŭzi tiel eta vergo tiel terurajn dolorojn.

— Draksango estas sur ĝi, draksango! — ili kriis. La lerteco kaj saĝo de Heraklo timigis kaj kolerigis ilin. Suspekteme, kun taŭzitaĵ vizagoj, kun senartikaj kriadoj ili tumultis al la Homo, tamen el certa distanco kaj ĉiam priatentinte lian manon, en kiu estis la sago. Heraklo sentime, sed kun interna naŭzo sentis proksimiĝi la ŝvelintajn okulojn de Nessus, en kiuj sangajn signojn postlasis la volupto de l' nokto. Kun firma minaco li levis la arkon: li pafos, se iu venos proksimen. La kentaŭroj retiriĝis kun sovaĝa timo.

Tiam Nessus transsaltis la ŝtonbastionon kun ruza ekkuro, tie, kie la roko jetita de l' malamiko rompis ĝin. Subite li staris ekstere, en la libera arbaro.

— Hej, kamaradoj! — li kriis al la malamiko. — Nes-

sus donas al vi vinon! Nessus donas al vi sian tutan vinon! Venu kontraŭ la homo! Li estas malamiko de l' kentaŭroj! Per malgrandaj tortur-vergoj li murdas nin: Venu, ni piedbatu lin je morto, ni disŝiru lin! Venu, venu!

— Venu, venu! — eĥadis la granda faŭko de l' groto, kriadis ankaŭ Belus kaj Khiron. — Consus, Ascalaphus, Chilo, Bergion! Venu ĉiuj! Fornax, Thioneus, Titan!

La arbaroj postmuĝis la sovaĝajn nomojn. Kaj subite okazis la atako. Ĉiu arbotrunko ekmoviĝis, de tie kaj tie ĉi monstroj aperis, ne por helpo, sed hura! ek! kaj samtempe de ĉiu flanko. Heraklo ekstreme rigardis la teruran batalon. Kio okazis? La fremdaj kentaŭroj — anstataŭ iri kontraŭ la homo — uzis la okazon por fini pri iliaj kamaradoj, kiuj kaŝis de ili la predon. Kaj liberiginte de la danĝero de l' sagoj, ili flugis al terura atako. La tero bruegis kaj tremis sub iliaj hufoj, la aero vibris pro iliaj krioj. La gigantaj korpoj kaptis unu la alian, la brakoj kunplektiĝis, kvazaŭ neniam volante delasi unu la alian, la blankaj dentoj mordis en la nigrajn ŝultrojn, ŝiris la ungoj, stampfe retroaŭmis la postaj piedoj. Ili sternis unu la alian sur la teron, piedbatis reciproke la bruston, duraj ostoj tranĉis en molajn, harajn karnojn, la monstraj korpoj aglomeriĝis en unu amason, terure baraktis, kiel la renversitaj skaraboj. Baldaŭ ununura, senforma volvaĵo tordiĝis inter la groto kaj arbaro, el kiu baraktis hufaj, maldikaj piedoj, streĉiĝis flirtantaj vosto kaj haroj, sangaj kapoj kaj brakoj. Nerekoneble, nedistingeble miksiĝis la hom- kaj ĉevalmembroj. La frapado de l' ostaj hufoj, kriegoj, veoj pleniĝis la valon. La nudaj virinoj horore rampis sur la ŝtonamason kaj rigardis la batalon. La suno aperis en sanga strio post du nuboj kaj ŝutis sangokoloron sur la pintojn de l' arboj.

Heraklo ĵetis ankoraŭ unu rigardon sur la himeran kirlamason. »Pli saĝaj, ol la homo« — li pensis. La plej alta saĝeco fermentis antaŭ li! La batalo jam saturis la tutan senarbejon, inundis en la arbaron, frapiĝis supren, en la altan aeron. La birdoj malespere kriĉis, la arboj kunfrapiĝis en la vento de l' lukto, ektimintaj kaj sovaĝiĝintaj bestoj kuregis el la densejo. Kaj aliaj bestoj kuregis en la batalon. Grandaj, sangaj bestoj, striaj, makulaj estaĵoj, etaj monstroj, gorgoj

kaj himeroj. Ili mordis en la bruston de l' kentaŭroj, grimpis sur ilian kolon, fandiĝis en unu korpon kun la granda volvaĵo. Kaj eĉ la skaraboj flugis batali, en teruraj nuboj, super la vaporo de vundoj haladzaj, de tripoj elturniĝintaj. Kaj ankaŭ la suno flugis batali kun sangruĝa ŝildo. Jam ĉio batalis, la Naturo batalis, la dioj batalis. La rikananta Pan sidis sur la supro de l' monto kaj instigis la batalon per terura fajfilo.

Nur Heraklo sola ne partoprenis la batalon. Ĉar li estis homo: lin neniel koncernis la tuto. Li havis aliajn batalojn; lin atendis celo kaj laboro. Li jam elŝiriĝis el la terura drivo: li havis apartan vojon. Kaj lian koron kaptis nepriskribebla fiero. Li streĉis siajn potencajn muskolojn: li estis freŝa, la sendormecon ili jam ne sentis. Poste li turnis sin, la arkon li metis sur la ŝultron, la sagujon sur la dorson kaj li ekiris sian vojon. Phoebus jam malligis sian flagrantan hararon kaj la gloraj radioj diverĝis sur la orienta ĉielo, larĝe, kiel radioj de grandega rado. Heraklo iris daŭrigi siajn laborojn, iris serĉi la postsignon de l' Apro. La bruo de l' luktantaj kentaŭroj iom post iom cedis post li. La nebuloj maldensiĝis, sur la arboj eksonoris la laŭta jubilo de l' birdoj, mil voĉoj trilaj, fajfaj, ĉirpaj, fanfaronaj. En la malproksimo ankoraŭ aperis la pala bildo de Hylas, sed tiu apartenis al la arbaro, kaj Heraklo estis sola, tute sola, kontraŭ la tuta arbaro!

Li iris kontraŭ la arbaron!

Sur la foliaro, sur la tero jam brilis la oraj makuloj de l' mateno. Ĉio vivis, ridis. Sed Heraklo iris vigle, atente inter la gajo: li jam konis la gajon. Kiu estas tiel forta, ke sekretaj potencoj ne povus lin logi en reton?

(Totsche.)